

# PENSEO

*N-ro 399*

*Jan. / 2025*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 36-a jaro <http://www.esplerno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



### Meditado

Naiva mensoget'  
en la orelon falas.  
Pri kio ĝi signalas,  
mi ne scivolas, sed  
de lundo ĝis merkred'  
mi pensas nur pri tio.  
Fortiĝas opinio,  
ke devus mi kun kred',  
se venis tiu pled'  
pristudi, – eĉ se klaĉon, -  
sed plaĉon, kaj malplaĉon  
forŝovi al bufed'.  
Deksepa cigared'  
jam estas forfumita...  
Mi estas informita,  
do ne plu decas ced'.  
Sufiĉas pensokned'!  
Mi devas jam reagi,  
al ofendintoj pagi  
per sama agrimed',  
ĉar ajna miskonced'  
min povus kompromiti.  
Ja eblas nur imiti,  
ke ekis la proced',  
sed poste, dum banked'  
paciĝi, eble, taste,  
manpremi - iom poste...  
Aŭ ne?! Ja la obsed'  
min daŭre perskutos,  
se la ofendon glutos  
mi sen rebati... sed,

pensante ĝis vendred',  
mi jam ne plu memoras,  
pro kiu blag' fervoras  
mi dum semajno! Ted'  
alvenas kun nekred',  
forfluas fiaj sentoj...  
Naiva mensoget' –  
sed kiom da turmentoj!

\*\*\*

Jarcentoj flugas for,  
sed tiujn tagojn helajn  
de l' glora histori'  
kun amo kaj fier'  
gardante en memor',  
bruligas ni kandelojn  
kaj levas glasojn ni  
tra l'tuta vasta ter'.

Jes, mavas tiu jar',  
la semojn de malamo  
ĵetanta kun fervor'  
en la milita pest',  
sed samas kalendar'  
vokanta al la samo,  
do fuĝu nia plor'  
kaj venu nia fest'!

\*\*\*

Kiam revenas inta enamiĝo,  
en sin' la tikla sproso  
aŭguras certan dozon de feliĉo,  
kaj ĉiutaga prozo  
bonvole cedas al sinten' lirika,  
indiferenta al la  
klaĉad' laika kaj mokad' laika,  
al la kadavre pala  
envia flustro ĉe apenaŭ aŭdo.  
En la vundita memo

la kor' indiferentas, sed la haŭto  
 reagas per ekstremo,  
 kvazaŭ trafinte malvarmegan akvon  
 kun bruliganta eco.  
 Ne estas tamen doloriga mav' en  
 la sento tiuspeca.  
 Kontraŭe, viglas viviĝantaj pensoj,  
 rimplekton plu naskante,  
 kaj por ekzist' aperas freŝa senc', kaj  
 la vivo daŭras kante.

\*\*\*

Subita neĝo – pura, mola –  
 ĝojigas certe min pli ol la  
 kutima koto mezaŭtune,  
 sed mi ja min demandas: - Ĉu ne  
 suferas miaj floroj en  
 la frosta spaco de l' ĝarden'?

Ilian vivon mi kun ŝato  
 longigu, eble por monato,  
 preninte hejmen de-sur bedo  
 l'aromon de la florbukedo.  
 Enhejme tiu-ĉi ornam'  
 varmigas.  
 Kiel lasta am'.



\*\*\*

Jen mia aŭtuno, la ĉarma kaj la senkompata  
 orvesta princin', ĉefrolanta en jaraj spektakloj,  
 rapidas al vintro mia,  
 sed en frumatenoj tra la nebulego densvata  
 ĝis nun de la suno penetras radioj - petaloj  
 obstaklon de vitro mia.

Jen unu petalo, tenere tuŝinta la vangon,  
 min petas vekiĝi, saluti l' matenon favore,  
 la revoj realen trotras,  
 incitas, ekscitas kaj spronas de l' sentoj

lavangon,  
 admonas impeti al kreo anstataŭ kuŝaĉi  
 langvore,  
 dum daŭre la sun' dorlotas.

Kaj mi, forgesinte pri plagoj, pri pezo de  
 l'aĝo,  
 la sunan petalon ne plu karesante sur vango,  
 leviĝas, labori preta,  
 kaj la transfenestra, eĉ se tro aŭtuna, pejzaĝo  
 nun estas ĝojiga, ĉar preskaŭ maturas kun  
 danko  
 en mi la inspir' sekreta.

\*\*\*

En la mezo de l'tempo somera  
 mi kantadis: "La tempo somera".  
 Ĉe alveno de l'tempo aŭtuna,  
 eksentante min jam ne plu juna,  
 mi voĉdonas per ambaŭ manoj  
 por la "Kanto de veteranoj",  
 kaj por kuna kantado morgaŭa  
 servu, certe, "La adiaŭa"...  
 Ĉiam venas la kapon sen vanto  
 porokaze konvena kanto.

\*\*\*

Sensenca babildad'  
 de la diplomatio -  
 la plej ŝatata plad'  
 por grego idiota.  
 Ve, sur diskuta pad'  
 nur ĉi galimatio  
 bobelas dum paŝad'  
 al cel' neatingota.

Ĉar lamas gramatik',  
 nin agi instruanta  
 ne nepre kun efik',  
 konvena por la venko,  
 sed pacon, ho amik',  
 atingos ne la vanta  
 kriado al publik',  
 flirtema kiel vento.

Kaj gapas la popol'

al falsigita vero  
 kriante en ekstaz'  
 sloganajn motojn stultajn.  
 ...Esper' pli bonas ol  
 foresto de espero,  
 ja havas homamas'  
 prudentajn.

Sed, ne multajn.

## Yi Qiao (ĉino en Germanio)



### Matena medito

Matensune l' korto helas frue,  
 fum' incensa flosas en trankvilo.  
 Te-vaporo ŝvebas nebulflue,  
 mi meditas mute kun aspiro.

Jen la rito por la frua preĝo,  
 ponto kontaktanta la profeton.  
 Menso puras kiel blanka neĝo,  
 l' univers' posedas la sekreton.

Trovos mi la bordon de l' senfino,  
 per flugiloj tra l' ĉiel' vastplena.  
 Laŭ l' kanalo sankta pri destino,  
 saĝo kreskas en la viv' serena.

Dum medito mi as edifita,  
 kun la kosmo jen la lig' spirita.

### Tagmeza medito

Tagmezsune l' korto netas plene,  
 fum' leviĝas el la incensvazo.  
 La altaro staras kaz-konvene,  
 mi meditas mute pro l' okazo.

Jen la kulto laŭ la deca rito,  
 l' atmosfero pias nun trankvile.  
 Al la kosmo soras la spirito,  
 sankta lumo flagras glore brile.

Mi nun retrovenas al fruaĝo,  
 la ridet' anĝela sorĉe ŝajnas.  
 Temp' kaj spaco vastas kun miraĝo,  
 gracon por la vivo mi nun gajnas.

Dum medito mi as inspirita,  
 jen kun univers' la ligo sprita.

## Nokta medito

Ruĝa l' sun' vespere jen subiras,  
 la krepusko oras sur ĉielo.  
 Ĉe l' altaro kulte mi aspiras,  
 kaj meditas mute en fidelo.

Kun imago pensas mi en tranco,  
 la anĝeloj ŝajne nun aperas.  
 Ili benas homojn kun bonŝanco,  
 dum rivelu el Ĉiel' misteras.

Jen la luno klara glore brilas,  
 palpebrumas steloj saĝoplene.  
 Nun profunde l' vasta kosm' trankvilas,  
 oni trovas faton sur-edene.

Dum medito mi as inicita,  
 kun rivelu brile sankt-spirita.

## Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Protektu sorto tiun, kiu pekis  
 Sed poste turmentadis sin rimorse,  
 Kiun la koro al pentado vekis,  
 Pro l' senta pur', ne pro rutina mor'; se  
 La jaroj draŝas, premas senkompate,  
 Dolorojn portas ĉiu nova hor',  
 Li firme staras plu sur sia pado  
 Kaj paŝon eĉ ne cedas al rumor'.

Protektu sorto tiun, kiu pene  
 Sed kun obstin' al celo nobla iras,  
 Kaj ĝin atingas per laboro, se ne

Rezignas, stumblas, fuĝas aŭ martiras.  
 Kaj, atinginte, tuj elektas novan  
 Sinceran, noblan celon por impet',  
 Sen stulta zorgo engravuri l'nomon  
 En la eminentula alfabet'.

Protektu sorto tiun, kiu amon  
 Al amatino donas senrezerve,  
 Eĉ sen gloragoj okulfrapaj, tamen  
 Sincere, ĝoje, tutanime serve.  
 Kaj, se estingas amon tempokuro,  
 Por ĉiam gravuriĝas en la sin'  
 Cikatro – de l'mortinta amo spuro,  
 Kiu dumvive plu turmentos lin.

Pensante nun pri mia vivo knara,  
 Mi diras, - ne orgojle, - savu Di':  
 - Ho, mia sort', ne estu do avara  
 Pri la protekto foje eĉ por mi.

\*\*\*

La ekdecembra tero nigras  
 inter pluvego kaj pluveto,  
 kaj senfoliaj arboj tremas,  
 tordataj de malica vent'.  
 Avinjo-vintro, eble, pigras  
 boacojn jungi al la sledo,  
 el la glacia land' ne emas  
 min feliĉigi per alven'.

Ie en sudo plu inundo,  
 ie en nordo plu blizardo,  
 sed inter tio kaj ĉi tio  
 min daŭre premas la angor',  
 kaj mi angore verkas nun do,  
 sed lundon, certe, sekvas mardo,  
 kaj la heltempa fantazio  
 l'angorojn certe pelos for.

Jes, certe, falos neĝo blanke,  
 la vintro ne evitos veni,  
 heligi mian mornan anton  
 per frida fajro de maljun',  
 kaj realiĝos mia plan', ke  
 ni renkontiĝu ie, se ni

ne jam forgesis nian kanton,  
 kiun mi reve zumas nun.

\*\*\*

Ni ne memoras, kiu min instruis,  
 Ĉu gepatroj, libroj, aŭ mem la viv',  
 - Ne forgesu iam ion bonan,  
 Kun animo pura ĉiam restos vi.

Se ofendis iu vin, mensogis,  
 Pro malbona ag' doloras kor',  
 Foliumu paĝon tiun nigran  
 Kaj kolerajn pensojn ĵetu for.

Ne forgesu iam belajn vortojn,  
 Helpon, agojn, manon de amik',  
 Sciuj, vortojn elradias koro  
 Kiel flor' kreskanta el radik'.

Kaj ne ŝanĝu lumon kun mallumo,  
 Lasu, ke ekflugu bona sent',  
 Estu en animoj niaj suno,  
 Eĉ se en la mond'- la ŝtorm' kaj vent'!

**Marzena Wawrziczkoa (Pollando)**

## eraro

la iluzio malaperas, la hologramo malaperas  
 la sistemo montras strangan mesaĝon  
 nova sperto efektivigita  
 renomante dosierojn sur la malmola disko

rapida rezulto, strategio malsukcesas  
 la koloso de hierarkio tremas en siaj  
 fundamentoj  
 instalita sur argilaj kruroj  
 silicia strukturo disĵetita en polvon

la pordego estas malfermita de la senfineco  
 de la ludo  
 la lumo frostiĝas kaj la mallumo ne saturas  
 ĝin  
 pasvortaj kodoj liberaj de ĉifrado  
 kiam la programisto forlasas la malantaŭan  
 pordon

## *paradizo*

trankvila promeno en nebula parko  
la lampoj estas estingitaj, mi povas spiri freŝe  
mi trempas miajn soifajn harojn per pluvo  
melodio teksita el akvo en vortojn

pluva vetero bonvenigas kristnaskajn arbojn  
plej bele ornamita per pluvetaj gutoj  
lumoj brilas el ĉiu branĉo  
la vento portas la odoron de piceaj rezinoj

neniu ilin tranĉas, ili pace kreskas  
la konusoj disverŝis siajn semojn  
la nerva sistemo vivas subtere  
la micelio elpuŝas siajn fruktkorpojn

mi ne povas kalkuli kiom da fungoj 'misformaj  
anseroj'\* estas

atendante homojn volantajn testi la guston  
lavitaj en la pluvo, ili restas firmaj  
vivo senfina kaj la tago estas kompata

*\*'misformaj anseroj' - manĝebla fungo - en la pola  
'gąski niekształtne', en la latina Tricholoma  
portentosum*

## *game\_over*

la sistemo liberiĝas de obeemaj estaĵoj  
sub la preteksto de militoj de malriĉeco kaj  
timo

la skalo de aktivecoj de la vekigintaj amasoj  
pligrandiĝas  
informoj fluas en la korkampon

la senfina signo rustiĝas kaj krakas  
kaj literumas la finon por ostigitaj strukturoj  
viro malprogramas sian ludon  
de la zorgo de dioj venantaj el la spaco

vi portas la fonton en vi, naĝas kun plezuro  
ligu ĉiujn gutojn kaj donu al ili novan formon  
kvietaj notoj resonos kun via melodio  
la paco ĉirkaŭ la ludo disfalas

\*\*\*

revegaj vidoj post la solstico  
reto rajtigita de la sistemo  
perdo de konscia ekzisto  
alia spektaklobildo por publiko

ni restas silente ŝanĝitaj en la tempo  
komedio de la universo ludas senhalte  
vive  
filozofio ŝarĝita en mallarĝajn cerbojn  
mi ne trovos inspiron ĉi tie hodiaŭ

suĉita animo post Karesmo  
la reklamoj doloras miajn okulojn kiam  
ili estas levitaj  
metu viajn piedojn sur la tablon kaj lasu  
la kompletan malstreĉiĝon daŭri  
mi ankaŭ havas komprenojn rigardante  
min mem

## *solstico*

ankoraŭ kelkaj minutoj kaj la somero  
eksplodos  
ravigos sudulojn per sia plej longa tago  
Romiaj Saturnalioj kaj la tago de Mithras  
en Irano  
sunaj diaĵoj atendas siajn festojn

do mia menso vojaĝas al Bonaero  
Mi iras al Atlantiko por varmigi mian  
korpon  
rememorante kun Adela la okazaĵojn de  
antaŭ jarcento  
kiam niaj samlandanoj devis forlasi  
Galicion

Mi trinkas yerba mate en kukurbo  
tiel la kukurboŝelo fariĝis vazo  
somero vintre varmigas mian imagon  
la rakonto fluas en la hispana kaj la pola

\*\*\*

Nur momenton antaŭ ol komenciĝas la  
malvarma sezono  
inter januaro kaj marto nomita ŝiŝira  
el neĝa roso kun glacia frosto

himālaya signifas la loĝejon de neĝo

Ĉu mi sopiras neĝon kaj skrapajn fenestrojn?  
Ĉu pasos alia glitsezono?  
amasoj da gruzo forlasitaj de malnova glaĉero  
fuĝante norden al la Balta Maro

ne la plej malaltaj temperaturoj por Kujawy  
ĉi tie la pluvo trankviliĝis, plenigante la  
akvofluojn  
sen zorgi pri la dato sur la kalendaro  
la varmomezurilo montris sep pozitivajn  
liniojn

La merloj mokas Dominik per sia kanto  
unuaj momentoj de decembro - vintro en la  
vetero  
la dudekunua estas suna tago  
en la anoncoj estas tempo por la plej mallonga  
tago de la jaro

## Nicolino Rossi (Italio)



Kornemuzistoj  
la duron kaj murdemon  
napolan  
vi vizitas...  
mi kunludas inter vi  
Avemarion  
por mia panjo  
olda kaj blankhara.

Ŝin mi vidas  
kortuŝitan  
sub larmvualo  
vin sekvi,  
humilaj konremuzludistoj  
kristnasktempaj....

Al kutima vivo  
labordura vi revenos,

post sezono da pacovekaj  
melodioj...  
Vi mesaĝas pacon  
al tiu ĉi urbo mafie turmentata,  
eĉ ĉijare,  
kiam trans viaj montoj  
denove ruĝas  
murdofajroj.

*en decembro 1982*

*El Oldula Notlibro*

*\*Kvankam pasis pli ol kvardek jaroj, neniel la  
turmentado de mafia agado mildiĝis en la Napola  
ĉiutageco....*

## Eugene Khvalkov (Rusio)



En stupega arbaro mi vagas,  
Kun bruo de folioj sub piedoj.  
La vento murmuris tra la branĉoj,  
Kantas birdetoj pri la magio de la universo.

La ombroj kovras la teron ĉirkaŭe,  
Magiaj aromoj plenigas la aeron.  
La suno donas sian lumon al la arbopintoj,  
Mi marŝas trankvile tra la dormema arbaro.

La aroma spiro de tera musko,  
Permesas mian spiriton kun ĝojo.  
La trankvilo kaj paco, kiujn mi trovas ĉi tie,  
En dolĉa arbaro, mia koro ĝojas ĉiam.

Per sia beleco kaj viveco brila,  
La arbaro estas vivo en si.  
Per ĝiaj arboj kaj bestoj amikaj,  
Mi sentas kunligon kun la naturo tiel tia.

\*\*\*

Inter la ĉielo kaj tero altiĝas la montoj fieraj,  
Iliaj pintoj eĥas la kanton de l' vento kaj suno.  
Sur la altaj krestoj, la ĉielo fandiĝas kun la bluo,

Kaj la tuta mondo subite paŭzos kaj silentos.

La grizaj rokoj, la verdaj arboj, kaj la blua ĉielo  
Kunfanditaj ĉe la supro de grandaj montoj tiel  
noblaj.

La ventoj kaj nuboj parolas pri la mistero de la  
montoj,  
Kaj ili en sia grandeco brilas kiel simbolo de  
forto.

Per stria pezeco ili montras la fortecon de l'  
tero,  
Kaj kun pacienco ili atestas la pacon de l' eterno.  
Kun sia majesta beleco, ili staras kiel gardistoj,  
Kaj donas al ni senton de humileco kaj grandeco.

Montoj altaj, viaj krestoj eternaj kaj riveroj  
Fluas sub via ombro, kiel simbolo de vivo  
senfina.  
Vi gardas la sekretojn de la mondo kaj la ĉielo,  
Kaj kun beleco, plenigas nin per sento de  
admira.

\*\*\*

Profundaj ombroj, silentaj riveroj,  
La arbaro spiras magion, kiel ĝi volas.  
Antikvaj arboj flustras antikvajn rakontojn,  
Magiaj estaĵoj, kiujn vi vidas kaj sentas.

\*\*\*

Kun magia bastono kaj flustro,  
Magiisto formas sonĝojn kaj direktas la  
stelojn.  
Liaj okuloj brulas, plenaj de mistera potenco,  
Li estas la majstro, kiu kreas magion.

## Blazio Vaha (Hungario)



### Insistaj demandoj de esperantismo

Ĉu vi legis la poemon,  
ĉu vi estas ĝin leginta,  
ĉu vi legis la poemon,  
ĉu vi estas ĝin legintaj,

kiu diras, ke ni venkos,  
ke ni estas ja venkontaj,  
kiu diras, ke ni ĝojos,  
kiam estos ni venkintaj.  
Ĉu vi legis la poemon,  
ĉu vi estas ĝin leginta....  
ĉu vi legis la poemon,  
ĉu vi estas ĝin legintaj,  
kiu diras, ke ni falos,  
ke ni estas fiaskontaj,  
kiu diras ke ni ploros,  
kiam estos fiaskintaj.  
Ĉu vi legis la poemon,  
ĉu vi estas ĝin leginta,  
ĉu vi la poemon legis,  
ĉu vi estas ĝin legintaj,  
kiu diras, ke ni emas  
Esperanton tamen uzi,  
per minac' pri malvenkado  
ne plu eblas nin konfuzi?  
Ĉar ja belo estas bela  
kaj la bono estas bona,  
kaj la vivo Esperanta  
estas al ni mem impona.

\*\*\*

Mi cin respektas.  
Ci min respektas.  
Mi vin respektas.  
Mi vin, ĉi tiun,  
kaj mi vin, ĉiujn.

Ni vin respektas.  
po unu, po dek.

Ni nin respektas.


Reciproke.  
Senprovoke.

Nin oni spektas,  
provas diveni,  
kion ni faros.

Oni nin spektas,

provas kompari  
nin jen al iuj,  
jen al aliaj.

## Elena Popova (Bulgario)



### *Ĉielarko por li*

Se iu vin petas  
helpu al li kviete.  
Li – branĉet' rompita  
pro venteg' subita.  
Lia anim' ĝemas  
kaj vivi malemas...  
Kaj la birdo vundita  
al la homoj venas.  
Etendu al li manon,  
donu akvon, panon!  
Donacon al li donu –  
ĉielarkon kaj vojon!  
Li kun fortoj novaj  
ekstaros denove.

### *Ĉe sunsubiro*

Vojo serpentumas tra la verdaj herbejoj ĝis  
rondetaĵ montetoj. Li ŝajnas malĝoja, soleca.

La ĉielo estas ekscitita, nigraj nuboj  
tranĉas la bluon, verŝajne pluvos ie. Ne estas  
homoj, bestoj kaj eĉ birdoj, ili kaŝiĝis en  
atendado. La suno ankoraŭ brilas, sed baldaŭ  
ĝi kaŝos sin malantaŭ la monteto por alporti  
lumon aliloken.

Ankoraŭ unu tago forlasas la kalendaron,  
kion ĝi alportis al la homoj, kion alportos  
morgaŭ? Paco estu!

### *Aŭtuna bildo*

Tri arboj sur la placo, kisitaj de la suno.  
La unua arbo de paradizo, kun brilantaj oraj  
folioj sude kaj  
verdaj norde. La tuta arbo tremas: "Mi estas  
juna! Mi estas bela! Amu min!..."

La dua apud ĝi, kun folioj de malhela oro,  
ĉirkaŭita de bruna krono, kaj sur ĝia pinto-  
verda tufo krias: „Mi ne rezignas! Ne  
rezignas!..."

Kaj la tria en linio, kun malhelaj nuancoj de  
koloroj, humile flustras: "Ĉio estas pasema!  
Ĉio!..."

Tri arboj ĉirkaŭitaj de lumo.

Aŭtuno-pentristo ĝuas siajn kreaĵojn.

## Ardo (Ĉinio)



### *Frostaj tagoj en Vintro*

en la sezonaj ŝanĝoj la malvarma vintro venas,  
la nokto eklongiĝas, eĉ la sonĝo min ne ĝenas.  
velkintajn herbojn de la suda monto kovras

neĝo,

ĉebordajn arbojn kovras blanka prujno en  
sieĝo.

mi legas libron ĉe kandelo en kvieta domo,  
por drinki ĉe la forno mankas al mi kara  
homo.

mi ja esperu, ke la umefloroj baldaŭ ridos,  
en la printempo la novaĵo bona min ekscitos.

## Hans-Georg Kaiser (Germanio)



### *Elirvojo*

Mi, kiu perdis la vojon,  
ne plu scias,  
kiun vojon mi iru.

Mi iras, sed mi jam ne scias,  
kial mi iras plu sur tiu vojo.

Mi iras, sed mi ne plu scias,  
kien mi iru.

Mi iras,  
sed mi perdis jam ĉiun esperon,  
ke la vojo kondukos min al celo.  
Mi iras plu, sed mi jam ne scias,



kial mi iras ankoraŭ nun sur tiu  
tro ofte uzita vojo.

Mi iras, sed mi ja jam scias,  
ke ankaŭ tiu vojo,

kiu iam estis mia celo,  
ne kondukos min al celo.

Mi iras plu,  
tute mekanike,  
pro certa malkuraĝo,  
sed mi nun cerbumas obstine pri tio,  
kiun vojon mi efektive iru.

Mi iras plu,  
sed mi trovos kiel ĉiam –  
nur novan fuĝvojon.

## Jadranka Miric (Serbio)



### Inundado

Dutaga pluvado  
jam enuigis jam nin.  
Revenu sunradiado,  
mi preĝas, por varmigi nin.

Sufiĉas tiom da pluvo.  
La tero akvon sorbis,  
sed ne plu akcepti eblas,  
Tial inundoj rapide revenis.

Granddolore ridadis ni pri  
raportoj el najbaro, el plejproksimo.  
Malbonaĵoj atingis homojn preskaŭ sur  
pinto de timo.  
Kortuŝa estas homa batalado kontraŭ  
ŝlimorestaĵo, fi!

### Varma tuŝo

Ĝue mi staris antaŭ sunradio.  
Ĝi varme tuŝis la korpon mian.  
Same karesante grizan hararon vian.

Dankemas mi al ĉi beno de Dio.

Varma tuŝo bonvenas  
al nuda frostita branĉar',  
al matene fluganta kolombar'  
al frumatena stratopurigistar'.


### *Inter sonĝo kaj realo*

Aĉetos mi  
la novjaran arbon.  
Ornamigu ĝin vi  
laŭ prefero via.  
Tamen se ĝi plaĉus al familio mia!

Sur la arbopinto estu verda stel'  
sube la donacetoj kaj vitropoteto kun  
Miel'!

Ekkantu garolo kaj najtingalo!  
Deklamu vi la poemon  
pri bela kaj certa estontec',  
kie regas homa solidarec'.  
Plue, semu ni pacan semon,  
surbaze de amo inter homoj.  
Al ĉiu hom'  
donu po unu pom',  
Unu por paĉjo, unu por panjo, same por  
infano!  
Mi ne estas ŝercemul',  
nek mi estas homa nul'!  
Kiel Dio diras  
tutanime mi tion sopiras.

## Ivanichka Magharova (Bulgario)



### *Pluvo*

Pluvo  
frapas sur la fenestro  
la infaneto  
dormas kun rido  
sur sia vizaĝo.  
Songas ĝi  
la kison de la patrino.  
Ŝi

laboras duan brigadon  
 kaj baldaŭ venos.  
 La patro  
 estas ie en la mondo  
 laborante por la pano.  
 Pluvo  
 frapas sur la fenestro.  
 Mateniĝas.  
 La mateno  
 estas kovrita per  
 la purpurkoloro de la Dioj!  
 Sed en la ĉambro  
 daŭras la silento!  
 Pluvo  
 frapas sur la fenestro.  
 La tago  
 komenciĝas denove.  
 La floroj velkas  
 soifaj por konsolo.  
 En la ĉambro  
 regas silento!  
 La vortoj mortas!  
 Pluvo  
 frapas sur la fenestro.  
 La pordoj grincas  
 forlasitaj sen amo.  
 La tago  
 mortas kruela kaj  
 indiferenta.  
 La doloro restas!  
 Pluvo  
 frapas sur la fenestro

## Erika Godó (Hungario)



### *En la tagiĝo de Nova Jaro*

En la tagiĝo de Nova Jaro,  
 espero vekiĝas kun nova klaro.  
 Promesoj estas faritaj,  
 lumoj en niaj koroj klariĝas.  
 Ni malfermas purajn paĝojn,

forigante ĉiujn malnovajn ŝarĝojn.  
 Promesoj videblas ĉe nova horizonto,  
 pliboniĝi, serĉante novajn vojojn.

Sano, feliĉo, mono kaj amo,  
 ili brulas en nia koro kiel flamo.  
 Kiuj vivas en niaj koroj,  
 gvidas nin al feliĉo sen doloroj.  
 Ĉiu paŝo, ĉiu ago, novjara promeso,  
 kiuj donas al vi forton, ne nur iluzio.  
 Espero, fido kaj amo, jen la vojo,  
 en tiu ĉi tagiĝo ni ĝojas kun ĝojo.

## Kristnaska nokto

Kristnaska nokto briligas stelon,  
 varmo kaj amo lumigas la belon.  
 Vico de donacoj sub pinarbo,  
 infanaj okuloj brilas kiel arbo.  
 Neĝflokaj dancas en la silento,  
 flugiloj de anĝeloj flugas en vento.  
 La lumo de kandeloj mallaŭte flagras,  
 la magio de Kristnasko ĉie brilas.

Familioj kune, mano en mano,  
 en koroj espero, paco kaj amo.  
 La odoro de dolĉaj kukoj venas,  
 al ni ĉiu miraklo de Kristnasko  
 bonvenas.  
 Tintanta sono flugas malproksimen,  
 lumo de steloj gvidas nin proksimen.  
 Espero kaj ĝojo brilas en okuloj,  
 ĉar Kristnasko estas tempo de  
 mirakloj.

## Krizantemo

Krizantemo, aŭtuna flor',  
 sunlumo brilas sur petal'.  
 Ĝi dancas en la malvarma vent',  
 kiel feino en sonĝoj.  
 Vestita en koloro bela:  
 flava, blanka, purpura, ruĝa.  
 Ĉiu petal' estas miraklo,  
 donaco de l' naturo.  
 Ĝojo de mia ĝarden',

krizantemo, bela flor'.  
Fariĝu pli belaj tagoj,  
alportu trankvilon, pacon.

### *Nokto en Havano*

Havano brilas klare, kiel steloj nokte,  
muziko, ritmo, danco fluas sur ĉiu strato.  
La vento susuras inter malnovaj ŝtonoj,  
rakontas buntajn sonĝojn teksitajn el  
memoroj.

La bruego de maro flustras siajn  
sekretojn  
pri deziroj, kiuj naskiĝas sub palmaj  
ombroj.  
Muzikistoj ludas kanzonojn kun granda  
pasio,  
tero kaj ĉielo pulsas je ritmoj de rumbo.

Odoro de kafo kaj la bongusta rumo,  
ridado de amikoj, amoj kaj amikecoj.  
Bona cigaro, bruo de urbo forvelkas,  
lampoj lumigas kvazaŭ nur kandel'  
brulas.

Ĉio estas kvieta post noktomezo jam,  
revoj kaj deziroj pleniĝas en ĉiu hom'.  
Ĉi tiun mirindan nokton mi ne forgesos,  
revoj, gustoj kaj ridadoj ĉiam restas en  
memoro.

## Fernando Pessoa



### *Animoj*

Mi grandnombras je animoj,  
ja multfoje ŝanĝis mi,  
fremdas mi al mi sen limoj  
ĉar mankas propra konsci'.  
Esti mi animabunda  
igis min senkalmfekunda,  
vidanto kun vido strikta,  
ul' centsenta sed konflikta.

Al tia ecaro lige  
mi apenaŭ trovas min.  
Songê' aŭ dezir' miaj tige  
viglas laŭ sia rezin'.  
Plaĉas la nova pejzaĝo,  
la paso de mia aĝo,  
ĉiuj la vojaj sinuoj  
spit' al tiklo de la fluoj.

Paĝpaĝe sed sen harfendo  
mi legadas mian mion,  
pri l' faktoj sen sindefendo  
ĉu mi fuŝis, fuŝos ion.  
( Nu , marĝene , pro suspekto  
ĉu mi estis en neglekto,  
mi notas ... Viŝas! ) Nenio  
verfias ĉar verkis Dio.

## The Platters

### *Nur pro vi*

Nur pro vi  
Al mi ĉi mond' estas bel'  
Nur pro vi  
ne grizas la ĉiel'  
Nur pro vi , ja pro vi nur la viv' estas plezur'  
Min pleniganta per am' sen mezur'

Nur pro vi  
Ĉiu ŝanĝ' estos plaĉ' al mi  
Nur pro vi  
La viv' ĝuindas pli  
Man-en-mane ĝis  
Tre dolĉa kis'  
Nin prenu al Eden'  
Kiel vivi sen  
Am' kaj vi tie ĉi ?

*Tradukis*



**Wellington Rocha**

**(Brazilo)**

## CHOE Yeongmi

### *En la templo Seonunsa*

Al la floroj  
 flori estis pene,  
 tamen velki estis nur momente.  
 Sen la tempo vidi ĉiujn tutegale,  
 sen la tempo pensi vin eĉ unu fojon  
 estis vere nur momente.  
 Estus bone,  
 se forgesi estas  
 tiel nur momente,  
 kiel vi unuafoje floris en mi,  
 Ho, vi ridanta fore!  
 Ho, vi transanta monte!  
 Al la floroj  
 velki estis facilege,  
 tamen plenforgesi estis longe,  
 kvazaŭ poreterne longe.

## JO Jihun

### *Monahina danco*

Fajnsilka purblanka kaptuko,  
 belĉarme faldite, papilias.  
 La kapo razita helblua  
 kaŝitas de l' silka kaptuko.  
 La brilo fluanta duvange  
 verege belĉarmas, eĉ mornas.  
 En nokto – fandiĝas senvorte la vaksa kandelo  
 sur vaka scenejo;  
 la luno subiras en ĉiu folio de la paŭlovnio.  
 Manikoj longegas, ĉielo vastegas;  
 kvazaŭe per turno ŝi flugas, jen softe falditaj  
 graciaj bosonoj.  
 La nigraj pupiloj leviĝas lanuge  
 kaj kunas en unu stellumo de fora ĉielo.  
 Du gutoj, estiĝaj sur la persikfloraj belvangoj,  
 suferas mondaĵon, sed kleŝo jam estas  
 stellumo.  
 Fleksitaj-volvitaj, falditaj-strenitaj la manoj  
 aspektas la sankta dumana kunpremo  
 korfunda.

Ĉi-nokte jam estas la tria horloĝo – vigilas eĉ  
 griloj.

Fajnsilka purblanka kaptuko, belĉarme faldite,  
 papilias.

\* *Bosono*: korea tradicia piedvesto, surmetata kun  
*hanboko*, kaj elegante farita el silka aŭ kotona tolo.

\* *Dumana kunpremo*: kunpremo de la du manoj; tio  
 esprimas respekton, piecon, sanktecon en la budhana  
 rondo.

\* *Tria horloĝo*: en orienta Azio la nokta tempo estas  
 dividita en la kvin horloĝoj: 19h-21h, 21h-23h,  
 23h-01h, 01h-03h, 03h-05h.

## LEE Sanghwa

### *Ĉu printempo venas eĉ al prirabita kampo*

Nun jam aliula tero - ĉu printempo venas eĉ al  
 prirabita kampo?

Ricevante sunradiojn sur la tuta korpo,  
 tien, kie kunluiĝas la ĉielo blua kaj la kampo  
 verda,

mi nur paŝas, kvazaŭ en la sonĝo, laŭ la  
 kampvoĵeto kiel la linio de dupartigita  
 kaphararo.

Ho, vi, kampo kaj ĉielo kun fermitaj lipoj!  
 ŝajnas, ke en mia koro mi ne venis sola.  
 Kiu tenis? Kiu vokis? Mi frustriĝas. Diru al  
 mi.

Vento al oreloj miaj flustras,  
 ke eĉ unu paŝon mi ne haltu, kaj balancas  
 miajn orlojn.

Jen alaŭdo ĝoje ridas post la nubo kiel  
 junvirino trans la heĝo.

Kampo de hordeoj bonkreskintaj tre dankinde!  
 per subtila pluvo defalinta post la ĵus pasinta  
 noktomezo,

vi jam lavis vian kaphararon kiel garbo da  
 kanaboj.

Eĉ freŝiĝas mia kapo.

Eĉ mi sola iru kun plezuro.  
Bona akvovoja sulko, kiu serpentumas  
brakumante sekvan kampon,  
kantas kanton kaĵolantan suĉinfanon kaj mem  
sola iras nur farante ŝultrodancon.

Papilio kaj hirundo! ne urĝiĝu.  
Devas vi saluti leontodon kaj violon.  
Volas mi ekvidi ĉiujn kampojn prisarkitajn de  
la ricinoleitoj.

Igu min manpreni hojon.  
Ĉi tergrundon molan kiel pufaj mamoj  
mi deziras treti, ĝis la maleoloj sentos fridon,  
kaj eĉ havi bonajn ŝvitojn.

Ho, mia animo nescianta tempopason kaj  
kuranta senfinejon  
kiel knabo ĉe rivera bordo!  
kion vi serĉas, kien vi iras. Estas tre ridinde.  
Vi respondu al mi.

Kunodoro herba sur la tuta korpo,  
tie, kie bone kunmiksiĝas rido verda kaj  
malĝojo verda,  
mi ĉi tagon lame paŝas. Eble la printempa dio  
min instigis.

Sed nun tamen – prirabita estas kampo, tial  
prirabita povus esti eĉ printempo.

*\* Ricino: arbeca planto kreskanta ankaŭ en Koreio.  
Ĝiaj kapsuloj enhavas tre oleoriĉajn semojn.  
Ricinoleito estas homo, kies hararo estas ŝmirita per  
ricinoleo.*

## SIM Hun

### *Se la tago venos*

Se la tago venos, se la tago venos,  
nur se ĝis la ĉeso de la vivo mia venos tiu  
tago,  
kiam monto Samgak ekleviĝos kaj ĝojfole  
dancos  
kaj rivero Hangang renversiĝos kaj ŝprucegos,

mi do, kiel korvo alfluganta en ĉielo nokta,  
frapos per la kapo Ĝongno-sonorilon por  
sonigi.

Malgraŭ ke rompiĝos, dispeciĝos la kranio,  
mi plezure mortos – kiu bedaŭro do plu  
restus?

o

Tiu tago venos, ho! ho! tiu tago venos.  
Mi plorkuros kaj ruliĝos en la ŝoseego antaŭ la  
ses ministrejoj.

Se malgraŭe mia brusto kvazaŭ eksplodiĝos  
pro la ĝojo,

mi do per tranĉilo akra senhaŭtigos mian  
korpon,

kaj, farinte tamburegon, ĝin alligos al mi,  
kaj antaŭe staros en la procesio via.

Nur se mi eĉ unufoje aŭdos la fortegajn kriojn  
viajn,

malgraŭ mia falo sur la loko mi finfermos la  
okulojn miajn..

*\* Monto Samgak: Samgaksan, alia nomo de la monto  
Bukhansan en Seulo, alta je 836 metroj. Samgak  
signifas “tri kornoj”, kiuj metaforas por la tri plej  
altaj pintoj de la monto.*

*\* Rivero Hangang: la rivero, kiu trafluas Seulon.*

*\* Ĝongno-sonorilo: sonorilego en la seula kvartalo  
Ĝongno, per kiu en la malnova tempo oni anoncis la  
malpermeson de nokta irado.*

## BAK Nohae

### *Vojo kurbe ĉirkaŭira*

Pli bona estas pino kurbe kreska,  
ol arbo rekte supren etendita.

Pli ama estas onda akvostrio,  
ol orte suprenira akvostrio.

Pli bela estas river-monta vojo,  
ol rekte glatigita rapidvojo.

Pro tio, ke finiĝas rekta vojo  
kaj ne plu estas vojo,  
ne sidu fale,

ne iru turne.  
 La vivo estas iri  
 kaj estas spite iri.  
 Ke ni nun vivas, tio estas,  
 ke estas vojo plu por iri.

Ne estas vojo nur la rekta vojo.  
 Ne estas vojo nur la brila vojo.  
 Eĉ se la kurbe ĉirkaŭira vojo  
 ja estas fora kaj dolore pena,  
 ĝi venas pli profunda kaj pli hela.  
 La vojo estas iri malrapide.  
 La vojo estas iri respekte.  
 La vojo estas iri ĝisvivfine.

## LEE Eunsang

### Mi deziras iri

La hejmloko mia – suda maro;  
 jen vidiĝas ĝia blua akvo.  
 Kiel mi forgesus eĉ en songo  
 la trankvilan maron de l' hejmloko?  
 Flugus tiuj naĝobirdoj nune.  
 Mi deziras iri, iri tuje.

Mi sopiras pri la amikaro.  
 kunludinta en la infanĵaro,  
 Kiel mi forgesus por ĉiamo  
 pri l' hejmloka luda amikaro?  
 Kion ili faras nun ĉi-tage?  
 Mi deziras vidi, vidi haste.

Birdoj tiuj, kamaradoj tiuj,  
 estas en la hejmvilaĝo ĉiuj.  
 Sed pro kiu kaŭzo mi nur sola  
 vivas en aparta loko fora?  
 Ĉu mi ĉion ajn forĵetu tute  
 por reveni tien, tien tuje.

Mi deziras iri kaj kunkune  
 vivi kiel en la pasinteco.  
 Por vestigi mian koron bunte  
 kaj por harmonii en ridego  
 serĉi, serĉi iru mi en hasto

la senlarman tempon de la tago.

*Tradukis*



## Chojus Europe (Koreio)

### Vaso Papaj



## Ĉu aĉetebblas la feliĉo?...

Ĉu aĉetebblas la feliĉo, eĉ per kelke da gramoj  
 da haŝiŝo?

Ĉu povas malaperi kelke da hezitoj per glasoj  
 dormemigantaj?

Ĉu eblas, la rutino-sorĉistino ne turnu min al  
 lentuga knabo?

Pli bone enflamiĝu la koro, la sango elverŝiĝu  
 tra la vejnoj.

Mi liberigu la vivon – ostaĝo, iam kudrita per  
 la fadenoj, dornodratoj.

Ĉu eblas, eĉ unu tagon, ke la homo atingu  
 majestecon?

Ĉu eblas dominantaj ankoraŭ la diktaturaj  
 ombroj, kaptitaj de la avideco?

Ĉu eblas ke homoj, iam nuloj, ekbrilu pro la  
 saĝeco?

Pli bone ke mi vagabundu tra la steloj, kiel  
 speciala estaĵo, ĉiam sendorma.

Mi liberigu la aeron disde la poluado kio  
 forprenas la vivon ĉiam pli.

Ĉu eblas ke ni liberiĝu disde la malvarmo  
 antaŭ ol la sunleviĝo?

Ĉu ni povas atendi ke la mondo malsaniĝu,  
 rigardante tion, kion alportos al ni la ĉielo?

Ĉu eblas ke la eksplodo de la mensaj enbuskoj  
 alportu al ni larmoriveron?

Efikas ja la tempaj vundoj, animaj lecionoj,  
 demandas feliĉon.  
 Ĉar mi ne venas el la vivo malbone organizita,  
 sen revoj, sen emocioj, sen amo.

*Tradukis*



**Bardhyl Selimi**  
 (Albanio)

## El ĉina antikva poezio

Nalan Xingde (1655-1685)

### Konsolo al amiko

—laŭ melodio *Ario de oraj fadenoj*

Pro kio vi ĉagrene ploras?  
 Eĉ se l' ĉielo ĵonglus ja kruise  
 per destino nia, ni ne nin turmentus  
 en ĉiutagaj bagateloj maltenere.  
 Aferoj kontentigaj estas en mondo  
 malpli ol la malkontentigaj vere.  
 Ĉar vi talenton grandan havas,  
 feliĉo mankas al vi pro ĝi malespere.  
 Vi sidu sur la alta turo kaj rigardu  
 al la plejado, blovu fluton kor-libere  
 por ĉasi ĝojon kaj konsolon,  
 aŭskultu al batsonoj flugantaj leĝere  
 el tamburturo por anonci noktajn horojn,  
 tiel ke la duon' da nokt' forpasos ŝtele.

Ne vera viro deprimiĝas splene  
 pro sortobato, kun ŝirita koro.  
 Prefere remu boateton sur la lago  
 plezure tien kaj alien por konsolo.  
 Eĉ se vi havas multajn larmojn  
 kiel torento da aŭtuna pluvo de petolo,  
 elverŝu ilin al sovaĝaj kampoj  
 kaj antaŭ la amikoj, ho, sinjoro.  
 Ne vidu korteganojn en palaco kun envio  
 kiuj konkuras pri altrango kaj famgloro.  
 Trankvile restu kaj atendu, ke la luno

prilumos la ĥaason en l' imperia  
 metropolo.  
 En via templo floroj ĉie pompu  
 kiel neĝeroj flirtas ja en blankkoloro!

—laŭ melodio *Kvazaŭsonge*

En dek mil kampad-tendoj  
 soldatoj drinkis ĝis ebri'.  
 Sur la ĉielo steloj vibras  
 kvazaŭ jam preta fali kun magi'.  
 En sonĝo hejmrevenon mian baras la  
 rivero,  
 kaj bru' fluakva vekas min sen apatio.  
 La dormo daŭru,  
 la dormo daŭru.  
 Mi scias, ke vekigo mi el sonĝo,  
 kaj mi tediĝon sentos ja ĝis agoni'.



Wang Guowei (1877-1927)

—laŭ melodio *Ruĝigitaj lipoj*

Ĉu fortranĉi mian amsopiron?  
 Lastatempe mi ekscias klare,  
 ke ja tio estas tute senutila.  
 Ĉu mi povus ĝin fortranĉi enreale?  
 Tamen mi ĉiame en la sonĝo  
 serĉi l' senton jen amare.

Post vekigo l' sento kaj la sonĝo  
 malaperas tute ja senspure.  
 La fenestro okcidenta palas  
 sub la frida luno hela pure.  
 Siringfloroj en la tuta korto  
 blankas kiel neĝo senmakule.

—laŭ melodio *ruĝigitaj lipoj*

Nebula fumo ŝvebas en ravino,



kaj birdoj flugas inter nubtavolo.  
 Montpintoj verdaj jam frapitas  
 de vento kaj pluvego kun petolo  
 jen staras vid-al-vide firme  
 silente absolute sen parolo.

Prilumas suno ore la montpintojn  
 ĉirkaŭvolvigitajn de nebul-vualo.  
 La pejzaĝo en malhela lumo  
 heliĝas malrapide en la valo.  
 La voj' sinua ĵus irita per grimrado  
 nun ankaŭ videblas jen en klaro.

elĉinigi



**Veido (Ĉinio)**

## Ĉineske

**Yi Qiao (ĉino en Germanio)**

### Acerfolioj

— laŭ ĉinesko *Memoro pri palaca  
 knabino\**

Prefero,  
 sur holmo jen acero.  
 Acero  
 ruĝfolias  
 en prospero.



Mi restas ĝis vespero,  
 korplene de espero.  
 Espero

rozradias  
 en sincero.

*\*Memoro pri Palaca Knabino (ĉine: Yi qin'e) ĉina  
 fiksoforma poemo de du strofoj kun po 5 versoj de  
 3,7,3\*44 / 7,7,3\*,44 silaboj, laŭ rimarango aaA,xa /  
 aaA,xa (x=senrima)*

### Aspiro

— laŭ ĉinesko *Preludo de Akvomelodio\**

Jam kvindek jaroj  
 pasis rapide.  
 Printemp-briz' susuris  
 ĉie senbride.  
 Nia kampo verdis,  
 nia holmo buntis,  
 ni kuris ride.  
 Junan aspiron  
 ni gardas fide.

Sezonoj  
 de jaroj  
 forglite.  
 Ni impetas kune  
 ĉiam decide.  
 Tutmonde migrante,  
 ni alton ascendas,  
 supren avide.  
 L' sun' sensubira  
 brilas merite.

*\*Preludo de akvomelodio (ĉine: shuidiaogetou) ĉina  
 fiksoforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj  
 respektive de 55, 65, 665, 55/333, 47, 665, 55 silaboj  
 laŭ rimarango de xa, xa, xxa, xa / xxa, xa, xxa, xa (x =  
 senrima)*



Eldonas Redakcio de **Penseo**  
 Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veido)  
 Retadreso: [veido@163.com](mailto:veido@163.com)  
<http://www.esplerno.cn/penseo/penlisto.htm>

